



Informilo *por* Interlingvistoj

n-ro 114 (1/2021) ♦ 30-a jaro (tria serio) ♦ ISSN 1385-2191

*Eldonas: Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de
la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)*

www.esperantic.org esfacademic.org esfconnected.org
[@esperanticsf](https://twitter.com/esperanticsf) [@esfacademic](https://twitter.com/esfacademic) www.facebook.com/esperantic

ENHAVO

Bonvenon 3

Venontaj eventoj 4

<i>ESF Connected</i> ekseminarias!	4
ILEI kongresumos en Benino	4
Nitobe-Simpozio – Lingvo, Konflikto kaj Sekureco	5
Via Scientiarum	5

Raportoj 6

Belfasto, ĉefurbo de lingva justeco	6
Rusia Universitato de Amikeco inter Popoloj	7
Kvin jaroj da ekspoziciado en Litovio	8
Universalaj lingvoj, artlingvoj, planlingvoj: revoj kaj utopioj pri sentraduka mondo	8

Ĝeneralaj novaĵoj 9

La Bona Renkontiĝo	9
Esperanto kaj Internaciismo	9
Die Esperantobewegung in Ostmitteleuropa	9
Decolonial Subversions	10
Kolekto Hachette	10
Kvinpetala biblioteko	11
250+ fakaj Esperanto-vortaroj	11
La Esperantaj lernolibroj, kiuj neniam aperis	11
Dr Seán Ó Riain: por lingva justeco	11

D-ro Julián Hernández Angulo	12
Financita stipendio por doktoriĝo ĉe Universitato de Ulstero	12
Universitato de Insbruko	12

Libroj 13

Memoru ĉi praulojn	13
<i>Hector Hodler: Une posture pacifiste / Pacisma sinteno</i>	14
Prefaco de la bengala traduko fare de Probal Dasgupta de finna romano	14
Esperanto kaj interlingvistiko en la bengala	15
Universitataj lernolibroj de esperantologio kaj interlingvistiko	16
Du disertaĵoj senpage elŝuteblaj	17
Kontestataj lingvoj: la kaŝita plurlingveco de Eŭropo	17
Tradukite kaj netradukite: la promeso de traduko kaj ĝiaj malavantaĝoj	19
“Internaciaj helpolingvoj”	19
“La rolo de plurlingvismo kiel ilo por akceligi komercon inter la BRICS-landoj: ekonomika perspektivo”	20
Die Bienen und das Unsichtbare	20

Artikoloj 21

“Lingvaj homaj rajtoj kaj multlingva edukado: raporto de barata universitato”	21
“Malavantaĝoj en la preparado kaj eldonado de sciencaj referaĵoj pro la regado de la angla lingvo en scienco: la kazo de kolombiaj esploristoj en biologiaj sciencoj”	22
“La regado de la angla en scienco malhelpas diversecon – sed la komunumo povas labori por tion ŝanĝi”	22
“Justaj lingvorajtoj: socia kontrakto kaj konstitucia ekonomiko”	22
“Interlingvoj kaj interlingvistiko”	23
“Kiel instrui ĵus aperintan lingvon: la kazo de Esperanto”	23
“Esperanto-ĵurnalismo kaj legantoj kiel ‘administrantoj’: transnacia partoprena legantaro”	24
“ <i>Dorian Gray en la spegulo de la klaĉogazetaro</i> (1984) de Ulrike Ottinger kiel reflektajo pri kina Esperanto”	24
“Kunmetado en Esperanto”	25
“Konstrui artefaritan lingvon el nenio”	25
“Esperoj de lingvo: tutmonda modernismo kaj la senbabela scienco”	26
“Adjektivoj en rakontoj en la parolata Esperanto”	26
“Artefaritaj/periferiaj strukturoj: kion ili povas diri al ni pri la (morfo)fonologio de naturaj lingvoj”	26

Aliaj eldonaĵoj 27

Retseminario en la Universitato de Ŝirazo	27
La akademia revuo <i>Esperantologio / Esperanto Studies</i> inaŭguras novan serion	27
Informilo de la oficejo de UEA por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj	28
trans-kom	28
Quaderna	28
<i>ESF Connected</i> : Lastatempaj blogaĵoj	29

Stipendioj de ESF 30

BONVENON

Post nia pasinta numero, pli ol deko da artikoloj jam aperis en *ESF Connected*, la nova dulingva blogo de Esperantic Studies Foundation ĉe <https://esfconnected.org/>. Vidu paĝon 29.

En la plej unua el tiuj, “Ĉu via vico aŭ mia?”, Humphrey Tonkin klarigas la rezonadon pri la ofte miskomprenata unua vorto de la nomo de ESF:

La vorto *Esperantic*, kreita antaŭ duonjarcento, ne signifas “priesperanta” sed “rilata al klopodoj egaligi lingvojn”. Esperanto ja konsistigas unu el tiuj klopodoj, sed “esperantikaj” studoj rilatas al ĉiuj streboj por forigi lingvan diskriminacion kaj antaŭenigi lingvan egalecon.

Laŭ tiu spirito la atenta leganto de la nuna numero de *IpI* trovos mencion pri pluraj aliaj planlingvoj. Unu estas *jæjuca*, interesa piĝino de fiŝistoj en fikcia mondo, pretigitan de studentoj ĉe la Florida Ŝtata Universitato kaj prezentita en artikolo de Juan Coste Delvecchio. Ĉi-numere aperas ankaŭ la lingvonomoj volapuka, blisa, kvenja, talosa, klingona kaj alt-valiria.

Alia tia estas Elefeno, aŭ *Lingua Franca Nova* (LFN), kies fasoninto, George Boeree, bedaŭrinde forpasis en januaro. Dave MacLeod verkis kortuŝan tributon en okcidentalto, “[Quo li comunité interlinguistic aprenet de George Boeree](#)” (“Kion la interlingvistika komunumo lernis de George Boeree”):

Li punctu de vise de George Boeree esset sempre positiv: “Bon, fòrsan LFN ne es li max bon lingue auxiliari, ma to ne importa! Prova it e resta un poc con nos si tu vole!” esset su atitude. E ex to on videt un cose fascinant: mult Esperantistes esset ta scrient in su lingue! Vidente se benevenit e ne fortiat a renunciar lor fidelitá a Esperanto, ili partiprenet con grand guste al comunité e scrit mult coses.

(La vidpunkto de George Boeree estis ĉiam pozitiva: “Bone, eble Elefeno ne estas la plej bona helpolingvo, sed tio ne gravas! Provu ĝin kaj restu iom ĉe ni, se vi volas!” estis lia sinteno. Kaj el tio venis io interesege vidinda: ĉeestis multe esperantistoj, skribante en lia lingvo! Trovante sin bonvenaj kaj ne devigitaj rezigni sian lojalecon al Esperanto, ili partoprenis en la komunumo kun granda frando kaj verkis multajn aferojn.)

Mi estis unu el tiuj homoj, kaj estas ankoraŭ. Efektive, la plej lastatempa afiŝo en la blogo *ESF Connected* estas koincide mia senantaŭjuĝa komparo de iuj ecoj de Elefeno kaj Esperanto, verkita antaŭ la morto de Boeree. Tiu artikolo estas la unua el miaj “Planlingvaj ekskursoj”, pri kiuj mi esperas, ke ili montriĝos agrabla kaj longedaŭra serio.

Bondezirojn por 2021 al ĉiu leganto de *Informilo por Interlingvistoj*. La limdato por kontribuoj al la venonta numero estas la 31-a de marto.

Simon Davies
(redaktoro)

VENONTAJ EVENTOJ

ESF Connected ekseminarias!

<https://esfconnected.org/>

Ekde la 21-a de Februaro, la duonmonata akademia blogo *ESF Connected* estos akompanata de ĉiumonata rekte elsendita retseminario, *ESF Connected Live*. La temoj estos larĝ-ampleksaj, rilataj al la interesoj de ESF pri lingvistiko, lingva justeco, esplorado, lingva pedagogio, transkultura interagado, Esperantecaj studoj, kaj plu. Ni bonvenigas demandojn kaj temoproponojn el nia aŭskultantaro. La unua seminario verŝajne estos diskutrondo kun la Estraro de ESF pri ties propraj esploroj kaj pri la esplorcejoj de ESF.

Oni antaŭvidas, ke tiuj retseminarioj daŭros inter kvardek minutoj kaj unu horo, inkluzive de tempo por demandoj. La seminario komenciĝos je la 11-a horo laŭ la usona orienta horzono (Nov-Jorko). Ĉi-momente tiu estas UTC -4, sed ni sekvos la ŝanĝojn de la Nov-Jorkaj vintro-tempo kaj somertempo. La horon ni elektis por faciligi la partoprenon de homoj en Nord- kaj Sud-Ameriko, Eŭropo, Afriko kaj okcidenta Azio. Registraĵoj de la seminarioj estos poste disponeblaj en la Jutub-kanalo de ESF.

Por anoncoj de la monataj programoj, kaj por la Zoom-detaloj, bonvolu vidi la blogon mem.

ILEI kongresumos en Benino

7-an ĝis 14-a de Aŭgusto 2021

Mireille Grosjean

<https://www.ilei.info/>

Planata estas dutaga simpozio kadre de la Kongreso. Respondecos estrarano Radojica Petrović kunlabore kun la universitata laborgrupo de CED/ESF/ILEI. Kunvenigonte ĉeeste kaj neĉeeste esperantistajn kaj nesperantistajn universitatanojn, la simpozio celas emfazi Esperanton kiel lingvistikan studotemon kaj doni impulson al klerigado per Esperanto.

Por efike plani, ni faru tiel: eblaj partoprenontoj anoncu sian intencon partopreni ĝis la fino de Majo. Tiam, post esploro de la pandemia situacio en Benino kaj analizo de la aliĝanoncoj, la Estraro kaj LKK decidis, ĉu vere io okazos en Kotonuo. La preztabelo aperas en la retejo de ILEI, kaj la anoncoj pri intenco partopreni iru al ILEI per reta formulario.

Nitobe-Simpozio – Lingvo, Konflikto kaj Sekureco

Universitato de Ulstero, Belfasto (Nord-Irlando), 24-a ĝis 26-a de Julio 2021

<http://esfacademic.org/en/nitobe-2021/>

CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj), kun financa subteno de ESF, organizas sian venontan Nitobe-Simpozion ĉe la Universitato de Ulstero. La laborlingvoj estos la angla kaj Esperanto.

Daŭrigante la seminarion de la 16-a de Oktobro (vidu la sekvantan paĝon), la simpozio esploros tri ĉefajn temojn rilatajn kaj aktuale gravajn, per prezentoj, plenkunsida diskutado kaj diskuttrondoj:

- ◆ Lingvopolitiko en Nord-Irlando kaj implikaĵoj por potencodividado en kontestataj socioj
- ◆ Lingvo en la kunteksto de sekureco kaj konfliktoŝolvado en Eŭropo
- ◆ Lingvo en homaraj krizoj kaj iniciata pacokonstruado en la tutmonda kunteksto

Kontribuoj al la programo okazu nur post invito, sed ni bonvenigas esprimojn de intereso pri partopreno kaj kontribuo al tiuj kaj rilataj temoj.

Pro daŭra necerteco rilate la pandemion, eblos virtuale partopreni la simpozion, kvankam ni rezervis ankaŭ spacon ĉe la Universitato de Ulstero en Belfasto por la eventualo, ke fizika kunveno fariĝos ebla. Tiuokaze la vojaĝ- kaj loĝ-kostoj de invititaj prelegantoj estos pagitaj.

Bonvolu sendi korespondaĵon al nitobe-2021@sfu.ca.

Via Scientiarum

Liepāja (Latvio), 23-a ĝis 24-a de Septembro 2021

<https://www.liepu.lv/lv/kalendars/2021/9/24>

La kuna doktoriĝa studprogramo de la Universitatoj de Ventspils kaj Liepāja okazigos internacian lingvistikan konferencon, *Via Scientiarum*, por junaj lingvistoj, organizitan de la Fakultato pri Homaj Sciencoj kaj Artoj ĉe Liepāja kaj la Fakultato de Tradukaj Studoj ĉe Ventspils.

Belfasto, ĉefurbo de lingva justeco

Michele Gazzola

https://www.ulster.ac.uk/_data/assets/pdf_file/0011/677306/20-1.pdf

Michele Gazzola kaj Cecilia Gialdini (ambaŭ ĉe la Universitato de Ulstero, Belfasto, Nord-Irlando) organizis retseminaron pri “Lingva justeco kaj publika politiko” ĉe tiu universitato je la 16-a de Oktobro 2020, subtenitan de ESF.

La interna parto estis dediĉita al la prezento de la prilaborata referaĵo “Cele al indico de lingva justeco” de Michele Gazzola, Bengt-Arne Wickström kaj Mark Fettes:

Indicojn oni regule uzas en naciaj kaj internaciaj komparaj analizoj, sed ĝenerale mankas en la kampo de lingvopolitiko. Ĉi tiu studo skizas praktike fareblan, teorie pravigeblan bazon por indico de lingva justeco [...]

La ekstera parto estis publike malfermita. 76 homoj partoprenis la matenan sesion kaj 45 en la posttagmezo, plejparte el Eŭropo, sed ankaŭ el Usono, Malajzio, Barato, Niĝerio, Honkongo, Kameruno kaj Sud-Afriko. Seminario vere tutmonda. Tiu parto enhavis la jenajn prezentojn:

- ◆ François Grin, “La nocio de inkluzivo en lingva justeco”. Prezento de la projekto MIME (Moviĝpovo kaj Inkluzivo en Multlingva Eŭropo) kaj aliaj esplorprojektoj, kaj kritiko de diversaj (nebulaj) difinoj de inkluzivo.
- ◆ Andrew Shorten, “Enmigrado, lingvo kaj malavantaĝo”. Diskuto pri la “suplementaj inkluzivo-metodoj”, aŭ SIM-oj, adoptitaj en kelkaj socioj por antaŭenigi la inkluzivon de enmigrintoj, kiuj ne kapablas paroli la lingvo(j)n de la plimulto, ekz. per servoj por ili en ties propraj lingvoj.
- ◆ Bengt-Arne Wickström, “Teorio kaj praktiko de lingvopolitiko: rekta kaj nereakta diskriminacio kontraŭ malplimulto”. Prezenti kvantan indikilon de lingva justeco bazitan sur sociala ekonomiko.
- ◆ Gabriele Iannaccaro, “Lingva maltrankvilo kiel simptomo de lingva maljusteco: kelkaj sociolingvistikaj konsideroj”. Prezento kaj diskuto pri diversaj parametroj de lingva maltrankvilo por individuoj, kiuj povas estigi lingvan maljustecon, se tian maltrankvilon neglektas la ŝtato.
- ◆ Filomena Maggino, “Komplekseco en socio: de la konstruo de indikiloj al ties sintezo”. Diskuto de la metodikaj defioj rilataj al la fasonado de indikiloj spegulantaj kompleksajn sociajn variablojn, ekzemple la vivokvaliton.

- ◆ Brian Carey, “Lingva justeco kaj eksteraj preferoj”. Prezenti preferkontentigan modelon de lingva avantaĝo, kiu diras, ke ni mezuru ies avantaĝojn laŭ la grado, je kiu ties lingvaj preferoj kontentiĝas.
- ◆ Gordon Marnoch, “Konciza historio de la mezurado kaj administrado de la rendimento de publikaj servoj: la kazo de lingva justeco en perspektivo”. La indico de lingva justeco radikas en la pli granda problemo priskribi la vivon per numeroj, kaj universitatoj en publika administrado adoptis ĝenerale kritikan sintenon pri “objektivaj” indikiloj.

Pluraj ŝlosilaj ideoj elvenis el la seminario: La oficiala lingvopolitiko ja efikas al la socia, ekonomia kaj politika vivoj de individuoj. Kelkaj el tiuj rezultoj povas esti maljustecon. Tiujn efikojn eblas identigi, difini kaj mezuri, sed tio estas komplika problemo, kiu postulas plurfakan aliron. Tiun esploradon tamen akompanu bonkvanta skeptikeco, ĉar la numeroj permesas malsamajn kaj ofte konfliktajn interpretojn.

Rusia Universitato de Amikeco inter Popoloj

Dima Ŝevĉenko

En Decembro sukcese finiĝis la unua ondo de distancaj Esperanto-kursoj en la Rusia Universitato de Amikeco inter Popoloj (Universitato RUDN).

Sume estis 15 lernantoj en tri grupoj. Du grupoj sukcese plenumis komencantan programon, kaj unu grupo programon por progresantoj. Gvidis la kursojn Anna Striganova.

Fine de la kursoj okazis ekzamenoj, en kiuj sukcesis ĉiuj kursanoj. Ili ricevos diplomojn (atestilojn pri plialtigo de kvalifiko) de la prestiĝa ŝtata universitato.

La kursoj ne limiĝis nur al lecionoj. Eksterkurse Valentin Melnikov kaj Mikaelo Bronŝtejn prelegis pri la kulturo kaj historio de Esperanto.

La 14-an de Novembro 2014 en RUDN, dum kunsido de la Scienca Konsilio, estis akceptitaj du studprogramoj por instruado de Esperanto. La 19-an de Novembro laŭ speciala peto ili estis oficiale validigitaj. Poste estis akceptitaj ankoraŭ kelkaj programoj.

Ĉar RUDN estas ŝtata universitato de federala nivelo kun rajto mem difini la studprogramojn, tiuj ĉi programoj iĝis aŭtomate tutrusiaj, kaj atestiloj de la sukcesintoj estas agnoskataj tra la tuta Rusio kaj en dekoj da landoj, kiuj havas specialajn edukadajn kontraktojn kaj interkonsentojn kun Rusio.

En ses jaroj, 70 personoj ricevis de RUDN diversnivelajn diplomojn pri kono de Esperanto.

Interesiĝantoj povas aŭskulti la ruslingvan prelegon de Valentin Melnikov pri originala Esperanto-literaturo. Ĝi daŭras proksimume horon kaj duonon:

http://phil.rudn.ru/images/portempa/19_decembro_Melnikov.m4a or <https://yadi.sk/d/l2XH6ABpwuewdg>

Kvin jaroj da ekspoziciado en Litovio

Povilas Jegorovas

el *La Ondo de Esperanto* 305 (3/2020), p. 33

<http://esperanto-ondo.ru/Ondo/Lo-305demo.pdf>

Ekde Aŭgusto 2017 ekspozicio pri la vivo kaj agado de Ludoviko Zamenhof jam sukcesis esti montrita en 22 lokoj de Litovio. Ĝi estas preparita de la Pola Instituto en Vilno kunlabore kun Litova Esperanto-Asocio (LEA) okaze de la centa mortodato de Zamenhof, kaj konsistas el 22 grandaj standoj, kiuj detale prezentas la vivon kaj agadon de Zamenhof kaj Esperanton. Kvar standoj estas dediĉitaj al Esperanto en Litovio.

En 2020 la ekspozicio estis aranĝita en la kulturcentro de Trakai kaj en la publikaj bibliotekoj de Kaišiadorys, Jurbarkas, Tauragė kaj Šilalė. En Oktobro ĝi ekfunkciis en la kulturcentro de Šakiai. Ekde la 10-a de Novembro ĝi estis eksponata en la kulturcentro de Marijampolė.

La ekspozicion en ĉiu urbo kaj distrikto akompanas ampleksaj artikoloj pri Zamenhof, pri Esperanto, pri la agado de LEA, pri famaj homoj kaj Esperanto k.s. en lokaj ĵurnaloj, en urbaj kaj distriktaj retejoj kaj en la retejoj de tiuj instancoj, kie okazas la ekspozicio. Danke al tio, pri Esperanto ekscias vasta loka publiko, ne nur la vizitantoj de la ekspozicio.

Laŭplane la ekspozicio devas esti montrita en ĉiuj grandaj urboj de Litovio, inkluzive de ĉiuj distriktaj centroj, entute en pli ol 60 lokoj. Tio daŭros pli ol kvin jarojn.

Universalaj lingvoj, artlingvoj, planlingvoj: revoj kaj utopioj pri sentraduka mondo

<https://www.ifk.ac.at/index.php/kalender-detail/>

[universalsprachen-kunstsprachen-plansprachen-traeume-und-utopien-von-einer-welt-ohne-uebersetzung.html](https://www.ifk.ac.at/index.php/kalender-detail/universalsprachen-kunstsprachen-plansprachen-traeume-und-utopien-von-einer-welt-ohne-uebersetzung.html)

Eblas elŝuti resumojn de la retseminario *IFK Live* de la Internacia Esplorcentro por Kulturaj Studoj (IFK) ĉe la Artuniversitato Linz en Vieno de la 18-a ĝis la 20-a de Novembro.

ĜENERALAJ NOVAĴOJ

La Bona Renkontiĝo

<https://www.laboren.org/200-nova-serio-enkonduko/>

<https://anchor.fm/stela-besenyei-merger>

LBR: Kreski kun Esperanto estas esplorprojekto de Stela Besenyi-Merger, subtenata de ESF, kiu okupiĝas pri kolektado de la spertoj de homoj, kies vivon iel tuŝis denaskuleco. Parton de la intervjuoj eblas aŭskulti en podkasto-versio por la pli larĝa publiko, tiel informante, distrante kaj espereble ankaŭ riĉigante la konon pri la temo de la Esperanto-komunumo.

La dek epizodoj havas la celon esplori kaj informi pri tiu ĉi fenomeno, kaj samtempe esperas allogi atenton de esploristoj, kiuj volonte uzus la intervjuojn por siaj propraj esplorprojektoj pri ekzemple uzado de Esperanto hejme, pri partopreno en la movado de Esperanto-familioj aŭ pri ĝenerala plurlingveco.

La intervjuoj en kruda formo kaj transskribitaj versioj estos alireblaj tra ESF ekde la fino de Februaro 2021. La babiladoj montras la spertojn en la Esperanto-movado, la decidon pri la edukado kun la lingvo, la praktikajn uzojn en la ĉiutaga vivo, la allogon de plurlingveco, la ĝojojn kaj defiojn pri eduki kun Esperanto kaj ankaŭ ofte aperas la nocio de honto.

Esperanto kaj Internaciismo

<https://www.transnationalhistory.net/esperanto/en/705ea-home/>

Jena novlanĉita retejo fare de universitatoj de St Andrews, aparte alloga por historiistoj, pritraktas Esperanton kaj internaciismon (en la angla).

Die Esperantobewegung in Ostmitteleuropa

<https://www.dhi.waw.pl/aktuelle-meldungen/detail/news/die-esperantobewegung-in-ostmitteleuropa.html>

Proksime rilata al *Esperanto kaj Internaciismo*, jen resumo de la duobla prelego “Polaj esperantistoj kiel lokaj internaciistoj? La Esperanto-movado en orienta centra Eŭropo, 1880-aj ĝis 1930” ĉe la Germana Historia Instituto (Varsovio).

Decolonial Subversions

<http://decolonialsubversions.org/>

Decolonial Subversions (“Malkoloniigaj Subfosoj”) estas nove establita eldonplatformo plurlingva kaj kolege reviziata, kun malfermita aliro, dediĉita al la elcentrigo de okcidenta epistemologio en la homaj kaj sociaj sciencoj. Ĝi celas plividebligi universitatojn el la sudaj landoj per subfoso de baroj kaj normoj, kiuj regas la kutiman anglalingvan produktadon kaj eldonadon de scioj.

Ĝi konsistas el internacia teamo da kunlaborantoj kaj similpensaj esploristoj, praktikantoj kaj profesiuloj el Barato, Etiopio, Senegalio, Namibio, Sud-Afriko, Honkongo, Hungario, Grekio, Moldavio, Italio kaj Britio.

La fondintaj redaktoroj, D-roj Romina Istratii kaj Monika Hirmer, estas en sia laboro subtenataj de teamo da fasonistoj, fotistoj, fakuloj pri retroprogramado, lingvopartneroj, tradukistoj kaj recenzistoj, el kiuj ĉiuj aperas en la platforma retejo kiel integraj membroj kaj koncernatoj de ĉi tiu iniciato.

La platformon oni oficiale lanĉis je la 30-a de Marto 2020 en rekta elsendo, kiun eblas spekti ĉi tie: <https://soas.hosted.panopto.com/Panopto/Pages/Embed.aspx?id=fb415194-f702-4fb4-bde3-ab8a010f4179>

Kolekto Hachette

Bernhard Tuidler

<https://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/gazeteltondajoj-1898-1915>
<https://data.onb.ac.at/rec/AC15757567>

Ekde la jaro 1930 la Esperanto-muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko konservas la tiel nomatan “kolekton Hachette”. Temas pri pli ol 17 000 gazetartikoloj (en 153 dosierujoj) pri Esperanto kaj planlingvoj el la tempo inter 1898 kaj 1915.

Komence de la 20-a jarcento du agentejoj por gazetara observado en Parizo (*Gallois & Demogeot* kaj *Argus de la Presse*) komencis kolekti gazetartikolojn el diversaj landoj (tamen kun videbla fokuso sur Francio) por la eldonejo Hachette. La gazeteltondaĵoj estis krude ordigitaj geografie kaj kronologie.

La bibliotekistoj de la Esperanto-muzeo en Vieno katalogis la kolekton laŭ la dosierujoj (kaj aldone listigis la unuopajn artikolojn – la listojn en XLS-formato vi povas peti de ni). Dum la venontaj monatoj ni skanos la tutan kolekton kaj publikigos la artikolojn en nia retejo, kie la unuaj jam nun estas legeblaj.

Kvinpetala biblioteko

<http://www.kvinpetalo.org/>

Philippe Cousson volas mencii al ni la ekziston de la biblioteko, kiun li prizorgas en Kvinpetalo, Esperanto-centro en Bureso (Francio). Ĝi entenas la postlasaĵojn de Gaston Waringhien, Roger Bernard, Georges Lagrange, Maurice Sujet kaj aliaj.

Philippe estas finanta la katalogadon de pli ol 7000 libroj (inkluzive duoblaĵojn) kaj multaj ĝis nun ne registritaj revuoj kaj arkivaĵoj diversaj. Ne ekzistas OPAC-katalogo, sed post la fino li diskonigos liston de libroj.

Esploristoj kaj studentoj povas demandi pri la ekzisto de dokumento, kaj ankaŭ estas eblo loĝi surloke por konsulti la bibliotekon.

250+ fakaj Esperanto-vortaroj

Szilvási László

<http://www.eventoj.hu/steb/vortaroj/>

Nun troveblas en la reto granda kolekto da Esperantaj fakaj vortaroj kaj terminaroj, libere uzeblaj, legeblaj kaj elŝuteblaj.

La kolekto inkluzivas ankaŭ laŭtemajn vortarojn, kaj estas parto de STEB, la Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko. Ĝi estas daŭre aktualigata. Se vi konas mankantan eron, bonvenas via sciigo!

La Esperantaj lernolibroj, kiuj neniam aperis

<https://leidenspecialcollectionsblog.nl/articles/the-esperanto-textbooks-that-never-were>

Carolien Stolte malkovris kompletan gramatikon de la tibeta lingvo, verkitan en Esperanto, en la Lejdenaj Specialaj Kolektoj.

Dr Seán Ó Riain: por lingva justeco

<http://www.aede-el.be/uploads/documents/BI/BI-2018-09.pdf> (paĝoj 4–5)

Ó Riain diskutas la laboron de la Eŭropa Esperanto-Unio en ĉi tiu intervjuo en la serio *Regards d'Europe* en la informilo de *Association Européenne des Enseignants – Enseignement Libre*.

Intervjuis lin Germain Pirlot.

D-ro Julián Hernández Angulo

Je la 12-a de Januaro 2021, Julián Hernández Angulo el Kubo sukcese defendis sian doktorigan disertacion: “Trejni metodikistojn de la angla lingvo kaj respondeculojn de Esperanto-instruado pri metodologia gvidado de la instru-lerna procezo”.

Gratulon!

Financita stipendio por doktoriĝo ĉe Universitato de Ulstero

Regado en lingve diversaj socioj

<https://www.ulster.ac.uk/doctoralcollege/find-a-phd/792538>

Limdato por kandidatiĝoj: 26-a de Februaro 2021.

Universitato de Insbruko

<https://www.uibk.ac.at/fakultaeten-servicestelle/standorte/innrain52f/berufungen/ausschreibungstexte/2.-transl-at-en.pdf>

La Universitato de Insbruko celas dungii profesoron pri tradukaj studoj.

Limdato por kandidatiĝoj: 28-a de Februaro 2021.

Memoru ĉi praulojn

<https://www.amazon.com/dp/1595694153/>

Humphrey Tonkin, profesoro pri angla literaturo, eksa universitata rektoro kaj iama prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, abunde verkis kaj prelegis ankaŭ pri la literaturo de Esperanto. En tiu ĉi libro li kolektis novajn kaj jam aperigitajn verkojn pri la temo, kun la celo kreskigi la intereson pri Esperanto-literaturo kaj ĝia historio.

“Se la literaturo en Esperanto prisemas la normalan lingvan interrilaton de esperantistoj, ĝi estas siavice prisemata de la formoj, normoj kaj antaŭsupozoj de la diverslingvaj verkistoj, kiuj verkas en Esperanto. Parto de la plezuro, kiun mi, kiel parolanto de la angla, sentas en legado de verkoj en Esperanto, estas konscia observado de la manieroj, laŭ kiuj la anglaj lingvo kaj literaturo respeguliĝas en la verkoj de tiuj Esperanto-verkistoj, kiuj, denaske aŭ alimaniere, konas bone la anglan literaturon kaj adaptas ĝiajn formojn kaj normojn al Esperanto... Sed samtempe okazas nekonscia ensorbo de aliaj literaturaj tradicioj en mia legado de neanglalingvaj Esperanto-aŭtoroj...”



- ◆ Movado aŭ kulturo? La ideologia bazo de Esperanto-poezio
- ◆ Pri tradukado en Esperanto
- ◆ Traduko kaj originalo en la Esperanto-literaturo
- ◆ *Hamleto* en Esperanto
- ◆ Sándor Szathmári kaj *Kazohinio*
- ◆ En la Valo de Mirindaĵoj: Clarence Bicknell, poeto, pionira esperantisto, sciencisto
- ◆ Tivadar Soros kaj Julio Baghy – transvivantoj
- ◆ Kaoso en Esperantio: eĥoj de la Holokaŭsto
- ◆ Tradukado de Soros: la defioj de vivmemoroj
- ◆ Pensoj pri Kalocsay
- ◆ La poezio de Baldur Ragnarsson: tradiciismo renkontas modernismon
- ◆ Marjorie Boulton, poeto fajre kora
- ◆ Literatura historio: ĉu plu verkebla?
- ◆ Esperanto kaj monda literaturo

Hector Hodler: Une posture pacifiste / Pacisma sinteno

<http://www.editionsnotari.ch/collections/hodleriana/hector-hodler-une-posture-pacifiste-pacisma-sinteno.html>

<https://www.amazon.fr/dp/2940617384>

Kadre de la Esperanto-movado la jaro 2020 estis proklamita Hodler-Jaro kun diversaj eventoj en rilato kun la centa datreveno de la forpaso de Hector Hodler (1887–1920), kiu fondis la Universalan Esperanto-Asocion (UEA). La Arkivoj Jura Brüscheiler, kunlabore kun Svisa Esperanto-Societo kaj UEA, volis konkludi tiun gravan jaron per aperigo de libro, kie la leganto malkovros informojn pri la vivo kaj la pensoj de tiu personeco, kiu profunde markis la Esperantistaron kaj la pacisman movadon de la komenco de la dudeka jarcento.

Surbaze de ankoraŭ ne konataj dokumentoj la verko provas prezenti la vivon de Hector Hodler tra liaj pensoj kaj agadoj, de la junaĝaj lernejoj al la starigo de humanaj agadoj dum la unua mondmilito. Tiu eseo metas la junulon en la kuntekston, kie naskiĝis liaj unuaj ideoj, esploras profunde la demandon pri Esperanto, speciale en la rilato kun lia patro Ferdinand Hodler, aktualigas la sciojn pri la fondo de UEA kaj alportas novan lumon pri lia agado favore al la militkaptitoj.

Plie tiu libro substrekas la verkistan talenton de Hector Hodler. De la junaĝaj tekstoj energiplenaj kaj ideŝprucantaj ĝis la gazetaraj artikoloj regule verkitaj por la revuo *Esperanto*, kiun li redaktis, Hector Hodler montriĝas kiel pensulo profunde enradikiĝanta en sia epoko, kiel homo kapabla konkretigi siajn surpaperajn ideojn en konkretajn agadojn, kiuj ankoraŭ hodiaŭ estas agnoskataj ne nur en la Esperanto-movado sed pli vaste tra la mondo.



Prefaco de la bengala traduko fare de Probal Dasgupta de finna romano

<https://probaleo.wordpress.com/2021/01/15/translators-preface-to-a-bangla-translation-of-a-finnish-novel/>

<https://boiraag.in/bookdetails1#1d56b1eb-8994-43d7-870b-3105e2b02bdc>

La bengaligo fare de Probal Dasgupta de la finna deknaŭa-jarcenta klasikaĵo *Seitsemän veljestä* ("Sep fratoj", 1870) de Aleksis Kivi (1834–1872), rigardata kiel la unua granda romanisto en la finna, aperis en Novembro 2019 kiel bitlibro, kaj tuj aperos kiel papera libro.

Eblas legi angligon kaj esperantigon de lia tradukinto-prefaco en lia blogo ĉe la unua adreso ĉi-supre. En la libro estas nur la bengala prefaco.

La rolo de Esperanto en lia romantraduka laboro estis jena: Dasgupta bazis lian redonon ĉefe sur la fama esperantigo de la romano (aperinta en 1947) kiel pontotraduko; nur por trakti dubajn punktojn li enprofundiĝis en la finnan originalon helpe de vortaroj kaj aliaj laboriloj.

Esperanto kaj interlingvistiko en la bengala

<https://wp.me/p2Aw52-2N>

Aperis ampleksa artikolo en la bengala (9000-vorta teksto) de Probal Dasgupta pri Esperanto kaj interlingvistiko, aperonta en pluraŭtora libro *Porikendrik bhaashaatatto* (“La periferia lingvistiko”, do la intertuŝaj fakoj kiel la psikolingvistiko, la socilingvistiko k.s.) kun ioma malfruo pro la pandemio.

La libro, en kiu aperos la ĉapitro, havas kiel celpublikon la studentojn kaj instruistojn, kiuj en universitataj fakultatoj pri la bengalistiko okupiĝas pri la lingvosciencia konsistero de la magistras kursoj. La ĉapitroj estas aparte verkitaj por tiu ĉi lernolibro; ne temas pri kompilo de pli frue aperintaj tekstoj.

Estas jama ligiteco de Esperanto al la universitata instruado de la bengalistiko en tiu regiono. D-rino Sovona Ghosh instruas la bengalistikon en altlernejo en urbeto iomete ekster Kolkato (do en institucio, kies studentoj fine de siaj kursoj ekzameniĝas ĉe la universitato de Kolkato kaj licenciĝas, je grado nomita “Bachelor’s degree” en la angla).

Dua ligo inter la bengalistiko kaj Esperanto aperas en la instruprograme de la prestiĝa instituto nun konata kiel la universitato Presidency en Kolkato; pli frue ĝi nomiĝis la altlernejo Presidency; ĝi estis fondita antaŭ ducent jaroj.

La bengalistika fakultato de tiu universitato, en la lingvistika konsistero ene de sia magistronivela kursaro, aranĝis, ke la skriba ekzameno por tiu specifa kurso regule inkluzivu unu demandon, kiu proponas al la kandidato du alternativojn. La unua alternativo liveras etan teksteron en la bengala kaj petas transskribi ĝin per la Internacia Fonetika Alfabeto. La dua liveras kelkajn Esperantajn frazojn kaj petas bengaligi ilin. Tial la studentoj, kiuj ne volas sin pretigi per lernado de la fonetika alfabeto, elektas lerneti elementan Esperanton.

Instruas en tiu fakultato Devarati Jana, kies ĵus finitan doktoran esploron pri la bengala lingvistiko direktis Probal Dasgupta. Ŝi lastatempe eklernis Esperanton, por ke ŝi povu respondecigi pri tiu parto de la kursa enhavo.

La apero de tekstoj pri Esperanto-scienco en neeŭropaj lingvoj estas salutinda.

Universitataj lernolibroj de esperantologio kaj interlingvistiko

Věra Barandovská-Frank
<https://katalogo.uea.org?inf=9832>



La unua lernolibro en la serio Interlingvistikaj Studoj (IS), *Interlingvistiko: enkonduko en la sciencoj pri planlingvoj*, aperis ĉe la Universitato Adam Mickiewicz (AMU). Ĝi kostas 27 eŭrojn.

La sekva lernolibro pri komunikado kaj kulturo (kun kontribuoj de kursgvidantoj de IS sub redaktado de Barandovská-Frank) estas preparata por planata apero en la unua duono de 2021.

Interlingvistiko, origine scienco stariganta normojn por helpolingvoj, plivastigis sian esplor-kaj studobjekton dum la cent jaroj da sia ekzisto. Ĝi iĝis interdisciplina sciencobranĉo, kiu kovras ne nur historion, teorion kaj praktikan esploron de planlingvoj, sed krome lingvo-planadon, lingvonormigon, multlingvecon, lingvopolitikon kaj aliajn aspektojn de komunikado, inklude de internacia uzado de etnaj lingvoj. Larĝe difinata kompreno kaj malfermas al interlingvistiko novajn horizontojn kaj ebligas pli profundan specialiĝon en unuopaj aspektoj.

Interlingvistiko estas ekde la pasinta jarcento instruata kiel studobjekto, dum la enhavo de unuopaj lecionoj varias laŭ specialiĝo de la koncerna instruisto. La Interlingvistikaj Studoj de AMU estas unikaj interalie pro tio, ke la “studentoj” estas ofte lingvistoj aŭ/kaj alifakaj specialistoj, kiuj per siaj laboraĵoj pliriĉigas la kursenhavon. Tiu ĉi lernolibro estas rezulto de dudekjaraj spertoj de studado kaj instruado en kunlaboro de la instruistino kaj la studentoj. La prezentata materialo respegulas iliajn preferojn kaj dezirojn pri enhavo de la enkonduka interlingvistika kurso.

La unua volumo de la lernolibros serio de IS de AMU povas esti bona fonto por ĉiuj interesiĝantoj pri planlingvoj kaj internaciaj lingvoj.

Du disertaĵoj senpage elŝuteblaj

Klaus Schubert

<https://www.frank-timme.de/verlag/verlagsprogramm/buch/verlagsprogramm/bd-48-melanie-maradan-uncertainty-in-deliberate-lexical-interventions/backPID/sprachwissenschaft.html>

https://www.frank-timme.de/fileadmin/docs/Maradan_Uncertainty_in_deliberate_lexical_interventions.pdf

Ĵus aperis la monografio de Mélanie Maradan: *Necerteco en intencaj leksikaj intervenoj: esplori la opiniojn de Esperanto-parolantoj pere de tekstaroj*. La libro estas disertaĵo verkita sub komuna gvido de la profesoroj Klaus Schubert de la Universitato de Hildesheim (Germanio) kaj Aurélie Picton de la Universitato de Ĝenevo (Svislando) kaj defendita en Novembro 2019. Nun aperis la presita libro, kiu estas samtempe senpage elŝutebla.

“Lingvodirektemuloj en siaj pluraj formoj (lingvoplanantoj, terminologoj, profesiaj neologismuloj ...) de longe provas interveni en la leksika uzado de parolantoj, je diversaj gradoj de sukceso: kelkaj el iliaj leksikaj eroj (parte) penetras la lingvouzon, aliaj ne. [...]”

<https://hildok.bsz-bw.de/frontdoor/index/index/docId/1178>

Kaj la nova reta libroserio *Fach–Sprache–Kommunikation*, redaktata de Franziska Heidrich-Wilhelms kaj Klaus Schubert, eldonis la doktoriĝan tezon de Andrea Hunziker Heeb, *Efikoj de direkto al la procezoj, produktoj kaj laboroj de profesiaj tradukistoj*:

“Ĉi tiu empiria studo pri kognaj tradukostudoj esploras, ĉu kaj kiel tradukado al fremda lingvo (L2) malsamas ol tradukado en la denaskan lingvon (L1). [...] Ĝi montras, ke la tradukodirekto klare ne ludas gravan rolon en la tradukoprocezo, la kvalito de la produkto kaj la traduka laboro. Ĝi do malvalidigas antaŭsupozojn pri tradukado al L2.”

Kontestataj lingvoj: la kaŝita plurlingveco de Eŭropo

<https://benjamins.com/catalog/wlp.8>

Jen la unua volumo tute dediĉita al kontestataj lingvoj. Kvankam ĝenerale listigitaj en internaciaj lingvomaparoj, kontestataj lingvoj kutime falas tra la fendoj inter esplorkampoj: ekskluditaj de la literaturo pri lingvoj de malplimulto kaj traktataj de tradicia dialektologio kiel nuraj ensembloj de geografie difinitaj variantoj.

Ĉi tiu volumo ekzamenas la naturon de kontestataj lingvoj, la rolon de lingvaj ideologioj en la perceptado de ĉi tiuj lingvoj, la kontribuon de universitateca diskutado al la formiĝo kaj

daŭrigo de lingvokontestateco, kaj la difekton kaŭzitan de kontestateco al lingvokomunumoj kaj fine al lingva diverseco.

Diversaj situacioj kaj gradoj de lingvokontestateco estas prezentitaj kaj analizitaj, kiel ankaŭ teoriaj konsideroj, esplorante eblajn vojojn al agnosko kaj problemojn en lingvoplanado, kiuj estiĝas el lingvokontestateco. Rekte traktante la demandon “lingvo aŭ dialekto”, la volumo malfermas novajn perspektivojn, kiuj rilatas al ĉiuj studentoj kaj esploristoj kun intereso pri la daŭrigo de lingva diverseco.

ENKONDUKO

- ◆ Marco Tamburelli kaj Mauro Tosco, “Kio estas kontestataj lingvoj kaj kial lingvistoj interesiĝu?”

LA LARĜA BILDO

- ◆ Marco Tamburelli, “Kontestataj lingvoj kaj la senhavigo de lingvaj rajtoj en la 21-a jarcento”
- ◆ Mauro Tosco, “Demokratio: minaco al lingva diverseco?”

IDENTIGI KAJ PERCEPTI KONTESTATAJN LINGVOJN

- ◆ Lissander Brasca, “Miksi metodojn en lingvoklasado: kaŝprojekto kontraŭ plurlingveco? La kontestateco de gaŭlo-‘italaj’ lingvoj ene de la latinida familio”
- ◆ Mara Maya Victoria Leonardi kaj Marco Tamburelli, “La kosto ignori gradoj de *Abstand* en la difino de regiona lingvo: atestoj el Sud-Tirol”
- ◆ Aurélie Joubert, “Malkonstrui la ideon de lingvo: la efikoj de la *patoisation* de la okcitana en Francio”
- ◆ Nicole Dolowy-Rybińska kaj Claudia Soria, “Superrigardi la etnolingvan vivoforton de du kontestataj lingvoj: la kazo de la kaŝuba kaj la piemonta”
- ◆ Emanuele Miola, “Kontestataj ortografioj: rigardi de pli proksime la spontanee skribon en la piemonta”
- ◆ Paolo Coluzzi, Lissander Brasca kaj Simona Scuri, “Revivigi kontestatajn lingvojn: la kazo de la lombarda”

LABORI KUN KONTESTATECO

- ◆ Andrea Musumeci, “Komunumobazita lingvoplanado: revivigi siciliajn popolarakontojn”
- ◆ Nicola Duberti kaj Mauro Tosco, “Instrui la piemontan: ĉu defion?”
- ◆ Andrea Francesco Daniele Di Stefano, “Eldoni gramatikon kaj literaturan antologion de kontestata lingvo: sperto pri amasfinancado”
- ◆ Federico Gobbo kaj Laura Vardeu, “Kiu sarda lingvo por edukado? La ŝanco de CLIL-laboratorioj (Integrata Lernado de Enhavo kaj Lingvoj): kazostudo”

PRETER KONTESTATAJ LINGVOJ

- ◆ Christopher Moseley, “Civitaneco kaj nacieco: la situacio de la uzantoj de la revivigita livona en Latvio”
- ◆ Federico Gobbo, “La lingva ideologio de Esperanto: de la monda lingvoproblemo al ekvilibra plurlingvismo”

Tradukite kaj netradukite: la promeso de traduko kaj ĝiaj malavantaĝoj

red. Nadja Grbic, Susanne Korbel, Judith Laister,
Rafael Y Schögler, Olaf Terpitz, Michaela Wolf

<https://www.transcript-verlag.de/978-3-8376-5249-9/uebersetztes-und-unuebersetztes/>

Tradukado promesas interŝanĝon, interkompreniĝon kaj kuniĝon inter malsamspecaj mondoj da agantoj. Sed samtempe ĝi montriĝas esence potenca ilo por praktiki regadon kaj samigi malsamaĵojn.

Tradukoprocezoj povas kunigi krom disigi kaj ĉiam renkontas la limojn de la netradukebla. La kontribuintoj al ĉi tiu volumo altraktas ĉi tiun streĉitecon kaj evoluigas la transfakan pensofiguron de la netradukita kiel eventuala spaco por opreso kaj silento, kiel ankaŭ por rezisto kaj sinkapabligo.



“Internaciaj helpolingvoj”

Federico Gobbo

en *La Internacia Enciklopedio de Lingvistika Antropologio*

<https://onlinelibrary.wiley.com/doi/full/10.1002/9781118786093.iela0178>

Internaciaj helpolingvoj estas lingvoj konscie planitaj por ebligi samtavolan komunikadon inter parolantoj de diversaj denaskaj lingvoj. Ili estas la plej evoluigita kampo de interlingvistiko, la scienco de lingvoj intence konstruitaj aŭ planitaj. La termino “helpo-” aludas al tio, ke helpolingvoj celas esti uzata nur kiel duaj lingvoj.

Ĝenerale helpolingvojn subtenas homoj malkontentaj pri la uzado de naciaj lingvoj – kiel la angla aŭ la franca – en internaciaj medioj, do ili antaŭenigas la uzon de “neŭtrala” ilo. Por la subtenantoj de helpolingvoj, “neŭtrala” signifas, ke ili ne ligiĝas al iu ajn specifa etneco.

La plej sukcesa internacia helpolingvo estas Esperanto, kiu sukcesis kunigi komunumon de praktiko sen notinda interrompo dum pli ol jarcento. Hodiaŭ internaciaj helpolingvoj ĝuas renovigitan atenton pro Interreto, precipe sociaj komunikiloj kaj Vikipedio, kiuj provizis ilin per nova videbleco al la ĝenerala publiko.

“La rolo de plurlingvismo kiel ilo por akceligi komercon inter la BRICS-landoj: ekonomika perspektivo”

Tiema Muindi kaj Byelongo Elisée Isheloke
en *BRICS kaj ekonomia evoluigo: plurdisciplina perspektivo*
<https://www.researchgate.net/publication/344675492>

Ĉi tiu studo esploras defiojn, kiuj frontas Brazilon, Rusion, Baraton, Ĉinion kaj Sud-Afrikon (BRICS laŭ siaj anglalingvaj nomoj) rilate al la efiko de lingva diverseco en siaj komercaj agadoj, kaj la potencialon de plurlingvismo por akceligi komercon ene de ĉi tiu komerca bloko.

Die Bienen und das Unsichtbare

Clemens J. Setz
<https://www.esperanto.de/de/enhavo/die-bienen-und-das-unsichtbare>

Pura signifo, pura poezio – ĉi tiu ideo ŝajnas instigi kaj motivi homojn tra la jarcentoj. Ĝi estas la motoro malantaŭ la invento de lingvoj kiel Esperanto, Volapuko aŭ la Blis-simbolaro. Clemens J. Setz prezentas la anekdotojn malantaŭ tiuj planlingvoj en *La abeloj kaj la nevidebla*, laŭ la maksimumo “Faru la plej bonan rakonton al vi konatan, kun kiom eble plej da vereco”.

Kaj ĉi tiu rakonto temas, interalie, pri Charles Bliss kaj lia simbola lingvo, pri handikapitaj infanoj, kiuj povas esprimi sin per la Blis-simbolaro je la unua fojo. Pri tio, kiel Clemens J. Setz pasigis someron lernante volapukon kaj prilaborante sian propran lingvon. Temas pri kredeble la sola denaska volapukisto, kiu iam ajn vivis, kaj la talosa planlingvo por la similnoma mikronacio proklamita de adoleskanto en sia dormoĉambro en 1979. Pri la klingona kaj la alt-valiria, lingvo kreita por la televida serio *Ludo de tronoj*. Kaj Esperanto, la plej granda sukcesintaĵo en la planlingva mondo, kies parolantoj persekutiĝis sub Stalino kaj Hitlero kaj per kiu juna blinda ruso fariĝis poeto, aventuristo kaj anarkiisma monda klerulo.

Tio estas aparta miksaĵo de profunda ekzistokrizo kaj lingva inventado, kion Setz daŭre ĉasas kaj ensorĉigas – kaj do ĉi tiu libro estas ankaŭ la persona rakonto de la lingvoartisto Clemens J. Setz.

“Lingvaj homaj rajtoj kaj multlingva edukado: raporto de barata universitato”

Giridhar Rao

eldonita por *Decolonial Subversions*

https://www.academia.edu/43460079/Lingvaj_homaj_rajtoj_kaj_multlingva_edukado_raporto_de_barata_universitato

<https://independent.academia.edu/DecolonialSubversions>

Tiu ĉi eseo raportas pri la desegnado kaj instruado de magistra-nivelaj kursoj pri multlingva edukado kaj lingvaj homaj rajtoj. Oni ofertas la kursojn en privata neprofitcela barata universitato, kiu havas eksplicitan celon je socia justeco. La planite diversa studentaro donas unikan ŝancon esplori la multlingvismon en la klasĉambro kaj en la socio: en Julio 2019 ekzemple, en klaso de 46 studentoj estis listo de 35 lingvonomoj!

La eseo unue prezentas la iom nekutiman fonon de la universitato. Poste ĝi donas super-rigardon de kelkaj aspektoj de la diverseco de la universitato. Post tio, ĝi priskribas kelkajn el la kursoj pri la multlingvismo, ĝiaj celoj kaj ĝiaj pedagogiaj strategioj. La universitato celas prepari pensemajn laborantojn por la socia sektoro – aparte en la edukado, la socia evoluo kaj la publika strategiario.

Pro tiu perspektivo, troviĝas cela kohereco inter la diversaj kursoj en la magistras programoj. La studentoj estas aparte sentemaj pri argumentoj pri diskriminacio, ekskludado, egaleco, rajtoj kaj strategiario. Tamen, dum socia klaso, kasto, sekso kaj regiono estas konataj aksoj de la ekskludado, ekzistas multe malpli da scio inter la studentoj pri la transkategoria naturo de la lingvo kiel io, kio respegulas, formas kaj reproduktas privilegion, diskriminacion kaj ekskludadon. Tiel, la kursoj pri multlingva edukado kaj lingvaj homaj rajtoj uzas la komprenojn, kiujn la programoj kaj la studentoj jam posedas. Plue, la kursoj instigas la studentojn kritike pensi pri ekzistantaj lingvaj neegalecoj, kaj verki novtipajn studprogramojn kaj pedagogion.

La eseo finiĝas per skizoj de du iniciatoj de la universitato, kiuj helpas formi kritikajn perspektivojn pri la barata multlingvismo, kaj dezajni edukajn kaj strategiariajn intervenojn, kiuj fortigos gepatralingve bazitan multlingvismon kaj kontribuos al la kreado de pli justa, egaleca, daŭripova kaj homeca socio. La eseo resumas la sperton instrui tiujn ĉi kursojn, kaj sugestas kelkajn vojojn por la estonteco.

Giridhar Rao havas ankaŭ interesan blogon, *Lingvo kaj Vivo*: <https://lingvovivo.blogspot.com/>

“Malavantaĝoj en la preparado kaj eldonado de sciencaj referaĵoj pro la regado de la angla lingvo en scienco: la kazo de kolombiaj esploristoj en biologiaj sciencoj”

Valeria Ramírez-Castañeda

<https://doi.org/10.1371/journal.pone.0238372>

<https://journals.plos.org/plosone/article?id=10.1371/journal.pone.0238372>

La sukceso de sciencisto dependas de ties produktado de sciencaj referaĵoj kaj la influkapablo de la revuo, en kiu oni eldonas. Ĉar plej multaj sciencaj revuoj estas eldonitaj en la angla, sukceso rilatas al eldonado en tiu lingvo. Nuntempe 98% el sciencaj eldonaĵoj estas verkitaj en la angla, inkluzive de esploristoj el landoj, kie la angla estas fremda lingvo.

Kolombio estas inter la landoj kun la plej malalta anglalingva kapablo en la mondo. Tial nepras kompreno pri la malavantaĝoj, kiujn kolombianoj frontas en eldonado, por redukti la mondan neegalecon en scienco. Ĉi tiu referaĵo kvantigas la malavantaĝojn, kiuj estiĝas el la lingva hegemonio en scienca eldonado per ekzameno de la aldonaj kostoj, kiujn kreas la anglalingva komunikado por produkti artikolojn.

“La regado de la angla en scienco malhelpas diversecon – sed la komunumo povas labori por tion ŝanĝi”

[https://www.sciencemag.org/careers/2020/10/](https://www.sciencemag.org/careers/2020/10/science-s-english-dominance-hinders-diversity-community-can-work-toward-change)

[science-s-english-dominance-hinders-diversity-community-can-work-toward-change](https://www.sciencemag.org/careers/2020/10/science-s-english-dominance-hinders-diversity-community-can-work-toward-change)

Artikolo en la anglalingva revuo *Scienca*.

“Justaj lingvorajtoj: socia kontrakto kaj konstitucia ekonomiko”

https://www.ulster.ac.uk/_data/assets/pdf_file/0006/797298/20-9.pdf

Publikaĵo de Bengt-Arne Wickström en la serio de la labordokumentoj de la esplorgupo REAL (Ekonomiko kaj Lingvo) ĉe la Universitato de Ulster.

Lingvorajtoj por malplimulto rezultas de lingvopolitiko. Ĉiu ero de lingvopolitiko, ekzemple dulingvaj stratŝildoj en iu urbo, povas esti analizata kiel publika projekto. Tia politikero estas efika, se la utilo de la mezuro por la profitantoj de ĝi superas aŭ egalas al la kostoj de ĝia realigo. Egalvaloreco aliflanke signifas, ke ĉiu homo havu la saman rajton uzi sian elektitan lingvon en iu ajn situacio kiel ĉiu alia individuo. Tio pro tro altaj kostoj ofte ne eblas kaj oni devas trovi kompromison inter efikeco kaj egaleco.

Justa politiko estas difinita kiel tia kompromiso farita laŭ kelkaj ĝenerale akceptitaj kriterioj. En tiu ĉi artikolo ni analizas tiun kompromison uzante la metodojn de konstitucia ekonomiko. Post mallonga diskuto de tiuj metodoj aplikataj al lingvopolitiko ni ilustras la analizon per

kelkaj ekzemploj. Ni demandas, kio estas justa decido pri dulingvaj stratŝildoj kaj pri konstruado de teatro por minoritata lingvo.

Ni montras, ke depende de la grandeco de malplimulto kaj de la kostoj de la politiko ni povas disdividi la analizon en tri tipojn. Du tipoj kondukas al klara eldiro pri justeco de la proponita politiko, kaj unu tipo rilatigas la difinon de justa politiko al la preferoj de la individuoj rilate riskon.

“Interlingvoj kaj interlingvistiko”

Başak Aray

(artikolo en la turka)

<https://dergipark.org.tr/en/pub/trkede/issue/52535/628628>

Ekde malfrue en la 19-a jarcento, konsiderinda nombro da lingvistoj pripensis la demandon pri planlingvoj pretigitaj por internacia komunikado. Ĉi tiu eseo enkondukas “interlingvistikon”, la lingvistika branĉo, kiu studas tiujn lingvojn. La lingvaj statuso kaj valoro de planlingvoj estas diskutataj pere de notindaj personoj en la historio de interlingvistiko, kaj oni liveras koncizan historion de la disciplino kun skizo de ties aktuala stato.

La konflikta sinteno de lingvistoj al interlingvoj indikas pli profundan disiĝon de vidpunktoj pri la temo (natura aŭ homfarita) kaj metodiko (priskriba aŭ konstrua) de lingvistiko. Tial debatoj pri interlingvistiko helpas nin klarigi la intelektajn fundamentojn de la lingvoscienco. Laŭ la konkludoj de moderna interlingvistiko, planlingvoj ŝajnas racia strategio por certigi justan komunikadon en internaciaj organizoj kaj ebla antidoto kontraŭ lingva hegemonio.

“Kiel instrui ĵus aperintan lingvon: la kazo de Esperanto”

Sébastien Moret, Universitato de Laŭzano
en *Méthodes et modèles de l'apprentissage*

des langues anciennes, vivantes et construites, hier et aujourd'hui

https://serval.unil.ch/resource/serval:BIB_13F542EE95EC.P001/REF.pdf

Esperanton imagis ĝia kreinto L. L. Zamenhof en 1887 kiel helpolingvon kun la intenco faciligi internacian komunikadon. Kun tia celo, la instruado kaj asimilado de la lingvo estigis nepran problemon. Sed kiam Esperanto estis eldonita en 1887, ekzistis nur unu malgranda manlibro (dua estis baldaŭ aperonta) kaj ankoraŭ neniu povis ĝin paroli. Kiel do oni instruis kaj lernis lingvon, kiu ĵus aperis kaj havis neniom da parolantoj? Pri tio temas ĉi tiu kontribuo (en la franca).

“Esperanto-ĵurnalismo kaj legantoj kiel ‘administrantoj’: transnacia partoprena legantaro”

Kevin Grieves

<https://www.tandfonline.com/doi/abs/10.1080/13688804.2020.1727319>

Antaŭ pli ol jarcento, Esperantaj revuoj portis mesaĝojn pri monda paco kaj pli bona interkultura kompreno al ĉiuj mondopartoj kaj celis konstrui internacian komunumon da parolantoj per la esprimado de sento de transnacia komuna identeco.

Ĉi tiu studo ekzamenas tiajn laborojn surbaze de la propraj eldonitaj vortoj de redaktoroj de Esperantaj revuoj, detalante, kiel ili konceptis sian laboron serve al esperantismo. Ciferecaj arkivoj de skanitaj Esperantaj revuoj (elektitaj el 1889–1912, formodona periodo en la Esperanto-movado) liveras la ĉefan fontomaterialon por ĉi tiu studo.

La studo ekzamenas, kiel Esperantaj periodaĵoj servis kiel lokoj por esprimado de sentoj de transnacia ligiteco. Ĉi tiu esploro prilumas aktive engaĝitan legantaron, kiun eblas vidi kiel heroldon de la hodiaŭaj nocioj de partoprena ĵurnalismo.


“*Dorian Gray en la spegulo de la klaĉogazetaro* (1984) de Ulrike Ottinger kiel reflektajo pri kina Esperanto”

Alessandra Madella

<https://www.cambridgescholars.com/products/978-1-5275-6017-8>

La plurlingva filmo *Dorian Gray im Spiegel der Boulevardpresse* (1984) estas la tria filmo de la “Berlina trilogio” de la germana reĝisoro Ulrike Ottinger. Ĉi tiu eseo enfokusigas la rilaton inter la filmo kaj la romano *Mr. Tot aĉetas mil okulojn* (1931), origine verkita en la internacia lingvo Esperanto de Jan Forge. Inter ili venas la peraĵo de *Die 1000 Augen des Dr. Mabuse* (1960), la lasta filmo de Fritz Lang.

La eseo argumentas, ke ĉi tiu interteksta rilato prilumas, kiel la filmo de Ottinger elfonigas la demandon pri lingva potenco kaj lingva diverseco. Ĝi argumentas ankaŭ, ke la plurlingva fokuso en *Dorian Gray* estas parto de reflektajo pri kina Esperanto, kiun eblas legi kiel estetikan tradukon de la filmoteorio de Miriam Hansen, kaj kiu gestas direkte al la kreo de pli aŭtentika publika sfero.



Ĉi tiu artikolo aperas en *Internaciaj perspektivoj pri plurlingvaj literaturoj: de translingvismo al lingvomiksado*, esearo el la konferenco Plurlingvaj Literaturoj ĉe Halo Gregynog (Kimrio), Julio 2019.

“Kunmetado en Esperanto”

Wim Jansen

en *Lingvistiko en Amsterdamo* vol. 13 no. 2

<http://www.linguisticsinamsterdam.nl/download?type=document&identifier=718614>

Ĉi tiu studo estas la tria en serio pri vortoj kaj vortofarado en Esperanto. La antaŭaj serioj pritraktis la parolelementojn de la lingvo kaj ĝian derivosistemon. Ĉi tie oni diskutas kunmetadon, tamen limigante la analizon al kunmetaĵoj kun du leksikaj komponantoj.

Kiel derivado, kunmetado estas priskribita kiel procezo funkcia ene de la leksiko. Oni trovas, ke plej multaj kunmetaĵoj estas determinativaj kaj endocentraj. La lingvo enhavas ankaŭ eksocentrajn kopulativajn kaj posesivajn kunmetaĵojn.

Oni donas ankaŭ kritikan analizon de epentezaj aŭ pontaj vokaloj ene de kunmetaĵoj. La aliron sekvatan inspiras teknikoj el funkcia gramatiko kaj estas tute nova kompare kun tradiciaj lingvistikaj priskriboj de Esperanto.

“Konstrui artefaritan lingvon el nenio”

Juan Coste Delvecchio

en *The Owl* (la studenta esplor-revuo de Florida Ŝtata Universitato)

vol. 10 n-ro 1 (paĝoj 100–114)

<https://journals.flvc.org/owl/issue/view/5549/137>

Konstruitaj lingvoj, ankaŭ konataj kiel planlingvoj, estas lingvoj homfaritaj por servi ian celon. La dotrakia kaj la alt-valiria en *Ludo de tronoj*, kaj la kvenja en *La mastro de l' ringoj* de Tolkieno estas kelkaj bone konataj konstruitaj lingvoj.

Ĉi tiu artikolo priskribas originalan planlingvon, *jæjuca*, kreitan por fiŝistoj kaj maristoj en la fikcia mondo Coweun. *Jæjuca* estas uzata en tiu fikcia mondo por komunikado inter homoj de malsamaj denaskaj lingvoj. Ĉar ĝi do similas al planlingvoj kiel Esperanto, oni povas klasi ĝin ankaŭ kiel helpolingvo.

Jæjuca (prononce /xœxuka/, signife “fiŝo”) estis konstruita kiel parto de klasprojekto, kaj poste evoluis preter sia origina celo kaj kreskis pro scivolo kaj intereso. Ĉiu tiu referaĵo estas kompleta priskribo kaj klarigo de la fikcia monda medio kaj lingvaj karakterizaĵoj de *jæjuca*, akompanata de ekzemploj pri la planlingvo uzata. La artikolo esploras la fonologion, morfologion, leksikon, kaj eĉ tradukojn de *jæjuca* al la angla.

“Esperoj de lingvo: tutmonda modernismo kaj la senbabela scienco”

Aarhi Vadde

<https://books.google.co.uk/books?id=ETkQEAAAQBAJ&pg=200>

Ĉi tiu anglalingva ĉapitro aperas en *The New Modernist Studies*, redaktita de Douglas Mao (Kembriĝa Universitato, 2021).

“Adjektivoj en rakontoj en la parolata Esperanto”

Natalia Dankova

en *Journal of International Scientific Publications: Language, Individual & Society* 14

<https://www.scientific-publications.net/en/article/1002115/>

Ĉi tiu studo ekzamenas, el psikolingvistika vidpunkto, la uzadon de adjektivoj en la rakontado de Esperanto-parolantoj el Francio, Italio kaj Rusio. La informantoj parolas Esperanton je tre alta nivelo kaj uzas la lingvon en sia ĉiutaga vivo. Malsame de aliaj lingvoj, Esperanto sekvas normon fonditan sur gramatika akceptebleco: iu ajn frazo gramatike konstruita akcepteblas.

Parolantoj, kies unua lingvo estas la franca, la itala aŭ la rusa enfokusigas malsamajn aspektojn de la situacioj, kiujn ili perceptas, kaj uzas malsamajn strategiojn por ilin esprimi. La plej frapaj diferencoj temas, interalie, pri la uzo de adjektivoj, ties funkcioj en la rakontado, kaj ties interago kun aliaj vortoklasoj (substantivoj, adverboj kaj verboj).

“Artefaritaj/periferiaj strukturoj: kion ili povas diri al ni pri la (morfo)fonologio de naturaj lingvoj”

Nina Topintzi kaj Giorgos Markopoulos

<http://sle2021.eu/downloads/workshops/WS%202%20Artificial%20peripheral%20structures.pdf>

Oni proponas laborkunvenon.

ALIAJ ELDONAĴOJ

Retseminario en la Universitato de Ŝirazo

Jen kompleta ligilaro al la filmoj de la prelegoj dum la tri tagoj de la Retseminario en la Universitato de Ŝirazo (23-a, 25-a kaj 26-a de Novembro 2020).

- ◆ Humphrey Tonkin, “La valoro de Esperanto en universitatoj”
<https://www.youtube.com/watch?v=tCC7GqxBPno>
- ◆ Dennis Keefe, “Esperanto en Ĉinio, usonano, 2000 horoj, postaj pensoj”
<https://www.youtube.com/watch?v=MlcKQJfxENQ>
- ◆ Francesco Maurelli, “Junularo kaj Esperanto”
<https://www.youtube.com/watch?v=KAra-wzsSz8>
- ◆ Federico Gobbo, “La mesaĝo de Zamenhof hodiaŭ:
Esperanto kaj ne nur”
+ Renato Corsetti, “Ĉiuj homoj naskiĝas egalaj”
+ Natalia Dankova, “Kiel Esperanto adaptiĝas al vi”
<https://www.youtube.com/watch?v=T-F6eyXZ4-A>
- ◆ Gong Xiaofeng (Arko), “Kiel mi enkondukis Esperanton en la Universitaton de Nanchang”
+ Vicente Manzano-Arrondo (Viko), “Esperanto kiel universitata liberigilo”
+ Ahmad Reza Mamduhi, “Kion Esperanto donis al mi, kaj kion ĝi povas doni al la mondo”
<https://www.youtube.com/watch?v=ZAUIEIlgUu50>



La akademia revuo *Esperantologio / Esperanto Studies* inaŭguras novan serion

<https://uea.org/aktuale/komunikoj/2020/La-akademia-revuo-Esperantologio-Esperanto-Studies-inauxguras-novan-serion>
<https://www.amazon.com/dp/1595694099/>
<https://www.esperantic.org/>



Esperantologio / Esperanto Studies estas internacia revuo pri ĉiuj fenomenoj rilataj al Esperanto. Ĝi aperigas artikolojn bazitajn sur originalaj studoj pri lingvosciencaj, historiaj, literatursciencaj, psikologiaj, sociologiaj kaj politikaj aspektoj de Esperanto, kaj ankaŭ recenzojn pri libroj. Ĝi publikigas materialon en Esperanto aŭ en la angla lingvo, sed estas principe malferma al materialo ankaŭ en aliaj lingvoj.

Ĝi estis fondita en 1949 de Paul Neergaard (Danlando) sub la nomo *Esperantologio*, kaj aperis neregule ĝis 1961. En 1999 ĝi estis revivigita kiel *Esperantologio / Esperanto Studies* fare de Christer Kiselman (Svedio), sub kies redakto aperis ĝis 2018 entute ok kajeroj. En 2019 ĝia eldonanto fariĝis CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj).

Sub la aŭspicio de CED, la numero 9(1) ĵus aperis, kaj jam estas mendebla ĉe la eldonejo Mondial kaj ĉe la Libroservo de UEA. Redaktita de Humphrey Tonkin kaj Orlando Raola, ĝi enhavas ĉefe referaĵojn prezentitajn en antaŭaj Esperantologiaj Konferencoj. La plena teksto de tiu ĉi numero estos baldaŭ havebla ankaŭ en la retejo de ESF.

La sekvaj numeroj estos redaktataj de Humphrey Tonkin (tonkin@hartford.edu) kaj Guilherme Fians (guilhermefians@gmail.com), en konsultaj rilatoj kun teamo de elstaraj esperantologoj. La numeroj konsistos el ĝis nun nepublikigitaj referaĵoj el Esperantologiaj Konferencoj, krom nova materialo kontribuata de esperantologoj – pri kio la redaktoroj aparte bonvenigas manuskriptojn sendatajn de junaj esperantologoj.

La revuo celas iĝi loko, kie esploristoj havu okazon prezenti siajn verkojn kaj ricevi konsilojn kaj sugestojn de nia rondo, en amikeca etoso, dum ni ankaŭ plimultigas fakajn materialojn kaj sciojn pri Esperantologio.

Informilo de la oficejo de UEA por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 49, Novembro-Decembro 2020

<http://en.esperantoporun.org/newsletter-for-november-december-2020/>

trans-kom

<http://www.trans-kom.eu>

Haveblas nova numero. Ĉe la ĉi-supra adreso troviĝas ankaŭ ĉiuj antaŭaj artikoloj.

Quaderna

<https://quaderna.org/>

Quaderna estas ĉiujara reta revuo kun internacia kolega reviziado. Ĝin eldonas la esplor-teamo IMAGER de la Universitato Paris-Est. Tiu teamo, strukturita ĉirkaŭ kvar lingvoj (la germana, angla, hispana kaj itala) estas transfaka.

Por speguli tiun strukturon kaj montri la plenan fortecon de la kombino de lingvoj, lokoj kaj fakoj, *Quaderna* petas kontribuojn de universitatoj kaj artistoj, verkistoj, muzikistoj ...

ESF Connected: Lastatempaj blogaĵoj

<https://esfconnected.org/past-posts/>

Plej multaj el ĉi tiuj estis afiŝitaj kaj en Esperanto kaj en la angla.

- ◆ “Ĉu via vico aŭ mia?” / “A turn for the better...”
Humphrey Tonkin (19-a de Oktobro 2020)
<https://esfconnected.org/2020/10/19/>
- ◆ “Ĉu lingva justeco vere gravas al ni? Tiukaze, ni mezuru ĝin!” /
“Do we care about linguistic justice? Then we should measure it!”
Mark Fettes (16-a de Novembro 2020)
<https://esfconnected.org/2020/11/16/>
- ◆ “Esperanto-lernado per *Major Trivia*” / “Esperanto Learning with Major Trivia!”
Jeremy Robinson (30-a de Novembro 2020)
<https://esfconnected.org/2020/11/30/>
- ◆ Letero de la prezidanto / A letter from the president
Humphrey Tonkin (1-a de Decembro 2020)
<https://esfconnected.org/2020/12/01/>
- ◆ “Okupi kun celo lokon sub ĉielo”
Hans Eric Becklin (15-a de Decembro 2020)
<https://esfconnected.org/2020/12/15/okupi-kun-celo-lokon-sub-cielo/>
- ◆ 2020 ESF Year-end Update
Humphrey Tonkin (15-a de Decembro 2020)
<https://esfconnected.org/2020/12/15/2020-esf-year-end-update/>
- ◆ “Lingvopolitiko: la kazo de Hajderabado, *Malkoloniigaj subfosoj* kaj Esperanto en barata universitato” / “The politics of language: the case of Hyderabad, *Decolonial Subversions*, and Esperanto in an Indian University”
Monika Hirmer, Giridhar Rao (1-a de Januaro 2021)
<https://esfconnected.org/2021/01/01/>
- ◆ *Bibliotekoj 1: “Diĝitaj dokumentoj el la Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko”* / *Libraries 1: “Digital media from the Department of Planned Languages at the Austrian National Library”*
Bernhard Tuidar (11-a de Januaro 2021)
<https://esfconnected.org/2021/01/11/>
- ◆ *Planlingvaj ekskursoj 1: “Vojaĝo en Elefenlando”* / *Conlang Excursions 1: “A Journey in Elefenland”*
Simon Davies
<https://esfconnected.org/2021/01/22/>

STIPENDIOJ DE ESF

Esperantic Studies Foundation havas du subvenciajn programojn: unu por Interlingvistika Subteno kaj alia por Ĝenerala Subteno.

Programo por Interlingvistika Subteno (IS)

Tio estas administrata de internacia komisiono sub aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ĝi aljuĝas malgrandajn subvenciojn, kutime malpli ol 2000 usonaj dolaroj, por helpi fakulojn kaj jam spertajn studentojn plenumi esplorojn en la fakoj lingvoplanado, interlingvistiko, transnacia lingva politiko, lingva justeco, kaj planlingvoj (inkluzive Esperanton). La subvencioj povas subteni aĉeton de (aŭ aliron al) esploraj materialoj, partoprenon en konferencoj, vojaĝadon al esplorbibliotekoj, subtenon de surkampa laboro, evoluigon de retejoj, kostojn de publikigo, k.s. Subvencioj IS estas aljuĝataj konkurse kaj kutime devas esti uzataj ene de unu jaro post ricevo de la subvencio.

Programo por Ĝenerala Subteno (ĜS)

Tio kovras ĉiujn tri aktualajn prioritatojn de ESF: Esploradon, Edukadon kaj Konservadon. Ĝi estas malferma al individuoj kaj organizaĵoj, inkluzive de universitatoj. Subvenciojn oni aljuĝas konkurse. Kvankam plej multaj subvencioj estas malgrandaj kaj kutime devas esti uzataj ene de unu jaro post ricevo, foje subvencioj estas aljuĝataj por pli longaj periodoj kaj en pli grandaj sumoj. Antaŭ ol peti subtenon, estas konsilinde sendi mallongan mesaĝon al admin@esperantic.org, por demandi ĉu la propono taŭgas. Petoj ĜS estas traktataj de subkomitato de la Estraro de ESF. Petoj ĜS, kiuj tamen kongruas kun la gvidlinioj IS, estos plusendataj al la Komisiono IS.

Limdatoj

Ekzistas tri limdatoj ĉiujare por subvencipetoj, en ambaŭ ĉi-supraj programoj:

- ◆ 31 januaro
- ◆ 30 aprilo
- ◆ 30 septembro

Por pli da informoj, bonvolu viziti: <https://www.esperantic.org/eo/stipendioj/stipendioj-de-esf>

I^pI estas eldonaĵo de Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. ISSN 1385-2191. Paralela anglalingva versio, *Information for Interlinguists (IfI)* estas ankaŭ disponebla. Ĉi tiun numeron redaktis Simon Davies kaj Angela Tellier.

Por ricevi avizojn pri estontaj numeroj, aŭ por sendi eldonotajn informojn, retmesaĝu al Angela Tellier ĉe ipi@esperantic.org. Limdato por la venonta numero: 31 marto 2021. Kontribuaĵoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj. Ni akceptas materialon en Esperanto aŭ la angla, aŭ ideale kiel la saman tekston tradukitan en ambaŭ lingvoj. ESF en la reto: <https://www.esperantic.org>, <http://esfacademic.org>, <http://esfconnected.org>, <https://www.facebook.com/esperantic>. Tvitero: @esperanticsf, @esfacademic.

Estraro de CED

Mark Fettes (direktoro), Guilherme Moreira Fians (esperantologio, interlingvistiko), Michele Gazzola (lingvopolitiko), Angela Tellier (universitataj studprogramoj), Orlando Raola (bibliotekoj). <https://uea.org/asocio/CED>